

ĈEĤOSLOVAKA

ESPERANTO

REVUO

la progreso

JARO XIV. NRO 9-10.

Novembro-Decembero 1932

APERIS 28. II. 1933.



OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.— ; fremdlando Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Sparkaso Praha: N-ro 34.271.

IDEALISMO — SED REALA!

Ni esperantistoj plendas ofte, ke nia afero ne prosperas tiel rapide, kiel oni deziras. Tiajn pesimismajn opiniojn ni devas korekti en propraj esperantistaj koroj. Kial ni estas ofte pesimistoj? — Estas fakto, ke multaj kursgvidantoj kaj lernolibraj antaŭparoloj ne akcentas moralajn devojn de esperanto kaj „produktas“ tro multe da idealoj. Ĉiu nova adepto estas tiel gvidata al troa entuziasmo, aŭ pli precize dirite oni komencas revii pri grandiozaj sed senbazaj idealoj kaj pri unu granda monda familio. Oni revas verdan revon. Ordinare la adeptoj, de ĉiuj „ismoj“ inklinas al tro senta perceptado de la ideoj. La entuziasmo estas ofte fortigata de gvidantoj, kiuj neniam forĝas per belaj vortoj semi idealisman semon en korojn de popolo.

Sed jen — post fino de kurso la adeptaro ekvidas penan laboron de lokaj kluboj, oni konstatas financajn malhelpaĵojn kaj oni vidas anstataŭ verda frata mondo nur kelkajn samideanojn, en kies zorgoplenaj kapoj vibras pli simplaj problemoj ol verda mondo sub signo de stelo. Oni konstatas, kiel malfacile estas varbi interesatojn por la kursoj, oni vidas, kiel multfoje estas pridiskutata la temo, ĉu estas eble elspezi certan sumon por aĉeti libron por kluba biblioteko, oni vidas, kiel la kasisto multfoje turnas ĉiun kronon antaŭ elspezo. Oni konstatas konstantan

deficiton de kursoj kaj oni ne povas kompreni, kial ĉiuj paĝoj de ĵurnaloj ne estas plenaj de nia idealo.

La seniluziigo post verda revo estas tre danĝera. Vidi anstataŭ ideoj en prospero nur penan laboron, tio kaŭzas tre sobrajn impresojn. De tio fontas la spontana pesimismo plifortigata ankaŭ per fakto, ke oni ne renkontas ĉiun duan homon surstrate kun verda stelo. Se oni renkontas eĉ plej, bagatelan baron kontraŭ akcepto de nia lingvo inter la publiko kaj aŭtoritatoj, tiam komencas la senespero, kontraŭ kiu oni ne estis inokulata per rezistiga serumo en la kurso. Rezultas malintereso, oni ĉesas regule vizitadi la klubon, eĉ la kotizon por sekvanta jaro oni ne plu pagas, falante en narkotan dormon de pesimismo.

Tamen de tago al tago ni povas vidi prosperon de nia afero, sed ni devas ĝin konstati per cerboj sobraj, neebriitaj per verda revo. La faktoj pri la sukcesoj, estas kaŝitaj por multaj, ĉar la sukcesoj, troviĝas en praktika vivo, kiun oni ne lernis esplori. Oni devas racie kompari propagandajn sukcesojn de esperanto kun sukcesoj de aliaj „ismoj“ kaj empirie trovi la kernon de la konkludo. Se oni povas konstati relative bonan sukceson de diversaj ideoj aŭ societoj, oni devas kompreni, ke inter simpla aliĝo al ia „ismo“ kun pago de jara kotizo kaj inter peno lerni la

lingvon estas fundamenta diferenco. Inter la publiko la devo lerni estas tre malŝatata pro oportuneco. Oni devas esti fieraj je niaj sukcesoj, ĉar la postulon „lerni“ plenumas ordinaro la homoj spirite kvalitaj. Jam la fakto, ke nia movado konsistas el kvalituloj, estas tre ĝojiga. Dank' al tiu afero vivas kaj progresas nia verda familio jam preskaŭ duonon de jarcento. Kiom da „ismoj“ kaj ideoj aliaj pereis dum tiu tempo!

Ankaŭ la verdigo de tuta mondo estas superflua. Mi citas praktikan ekzemplon: — Arkitekto el iu loko bezonas por sia studo la renesancan placon el Pardubice sur ilustrita karto. Eĉ se tiu arkitekto estas el Praha, do samnacia, li devas tien veturi kaj pagi grandan vetursumon por povi ĉe kiosko de tabakvendisto aĉeti la bezonan karton. Se ekzistas unusola delegito de UEA en Pardubice kaj nenioj esperantistoj plu, jam li povas tion prizorgi kontraŭ eta sumo de afranko. Ĉu tiu fakto ne sufiĉas por kompreni, ke sufiĉas en ĉiu pli grava loko nur unu esperantisto, delegito de UEA? Tuj estas eblaj plej diversaj, servoj sur la tuta terglobo. Tuj devas ĉiu konfesi la valoron de esperanto por monda kulturo. — La skribaŝinon ankaŭ ne ĉiu havas kaj ĝian valoron ĉiu devas aprobe. Fakte la homo ĝin posedanta estas en pli bona stato ol aliaj, sen ĝi. Same estas pri esperanto. Kiu ĝin scias, estas en pli bona stato rilate al nesciantoj, kvankam, kiel mi citis jam, kultura valoro de nia lingvo devas esti aprobata, eĉ se ni estus malplimultaj. — Ne restas ja sola esperantisto tro longe en ia loko sen adeptoj. De unu esperantisto plimultiĝas la nombro de novaj, samideanoj laŭ vico matematika aŭ geometria laŭ diversaj eblecoj kaj liaj spertoj. Ni vidas, ke la lingvo mem tute ne fratigas la homojn. Vidu en ĉiu nacio diversajn, inter si malamikajn partiojn. Esperanto per sia interna ideo eĉ ĉi tiun problemon solvas. Do ĝi estas superlingvo, laŭ lingvo kun idealoj. Kial malesperi konstatante ĉi tiujn faktojn?

Mi volas resumi, ke tute ne ekzistas kaŭzo, ke ni estu pesimisme agorditaj. Aliajn faktojn kuraĝigajn mi ne povas citi, ĉar da ili estas miloj. Mi nur kon-

J. S. MACHAR:

FUNEBRA VESTAJO.

Vi ne aspektis tiel bele
en blanka robo dum la bal',
nek en la blua vi tiele
min ravis en koncerta hal'
kiel en tiu nigra vesto,
funebra signo pro onklin',
ĉe kies enteriga festo
hodiaŭ mi renkontis vin.
Sub nigra krepo surĉapela
elrampis blonda harbuklar',
rigardis tra vual' malhela
la petolema okulpar';
aminde kun kostumo via
kontrastis via gajhumor' — —
kaj ĝermon de sopir' malpia
eksentis mi en mia kor':
ke antaŭ ol vi ĉesos porti
la nigran veston de malĝoj'
al vi bonvoĵu baldaŭ morti
iu onklin' je rea foj'!

El la ĉefa: Miloš Lukáš.

silas: esploru reale kaj vi trovos konfidon por nia afero. Instruante ne tro entuziasmiĝu per idealoj, sed laboru per faktoj kaj instru la faktojn trovadi! Laboru inter la publiko per raportoj, pri praktikaj eblecoj, raportu pri la sukcesoj, ĉar ili estas kanonoj de nia paca armeo. Turnu neniam la intereson de viaj adeptoj al nuraj idealoj, sed al praktika vivo. Mi estas certa, ke post tia kompreno de nia afero esperantistoj ne perdados intereson. Mi opinias, ke post bona kaj reala konstato ni gvidos nian optimismon al kulmino. Kредu, ke la optimismo batalos kun ni tre potence en nia paca batalo.

Francisko Staněk.

OBNOVTE PŘEDPLATNÉ

Usnadnite nám včasné vycházení
včasným zasláním předplatného.



K. ČAPEK:

KIU ESTAS PLI GAJA?

(El libro „O nejbližších věcech člověka“*)

Kiu estas pli gaja, ĉu viro aŭ virino? Ni estas kutimiĝintaj imagi, ke viro estas io terure serioza, kaj kontraŭe, ke virino estas ridetema kaj petolema estaĵo. Sed fakte virino estas plej ofte kreaĵo terure serioza, dum viro estas ujo de ĉia farso kaj ŝerco. Ĉi tiu erara opinio devenis kredinde el tio, ke viro prizorgas en socio plimulton da okupoj seriozaj kaj senĝojaj, kiel politikon, universitatajn prelegojn, verkadon de ĉef-artikoloj ĵurnalaj, pli altan librotendon, lokomotivestregon kaj aliajn. Tio certe estas vera, sed la seriozecon de okupo ne sekvigas la seriozecon de karaktero.

Krom tio ŝajnas efektiva, ke virino pli ol viro plezuras en amuziĝo, vi komprenu tion tiel, ke ŝi preferas lasi sin amuzi pli ol viro. Tio estas vero; sed ĉu ĝuste ĉi tiu bezono de amuzo ne dokumentas la mankon de propra kaj persona gajeco? Mi povus superŝuti vin per argumentoj, kiom malmultaj estas humoristinoj kaj komikulinoj; oni rajtas diri, ke la gajhumoro estas egale ekskluzive vira privilegio kiel filozofio, militaferoj aŭ framasonismo. Ni lasu la psikologojn, kiuj tion klarigas „ab ovo“ aŭ „ab ovario“; estas fakto, ke la vira temperamento estas pli ŝercanta, pli petolema kaj pli viglega ol virina.

Kie ajn estas nur kelke da viroj kunvenintaj, ekestas farso. Viroj havas strangan emon okazigi iun amuzaĉeton, verŝajne el naturdevena pieco al ilia patro, sinjoro bubo; ĉar bubo estas patro de viro. Mi ĝis nun ne estis ministro kaj mi esperas, ke mi ankaŭ ne fariĝos

ministro, sed en profundo de animo mi estas konvinkita, ke sinjoroj ministroj en ministrara konsilejo ligas al si reciproke la baskojn al seĝoj, ke ili sendas al si trans tablo sekretajn skribaĵojn, kaj kiam iu el ili eliras por momento, ke ili ŝovas en liajn ministrajn paperojn amleteron, paperon je ŝinko aŭ ludkarton; kaj se ili ne faras tion, certe ili devas sin tre memregi. Iun inciteti, fari iun ajn petolaĵon, tio estas unu el pli ŝatataj viraj pasioj.

Kontraŭ tio, virino eble estas pli dankema rigardanto ĉe ĉia farso, sed Dio gardu, ke ŝi estu ĝia iniciatinto aŭ farantino! Unue, ŝi mem tre neplezure fariĝas viktimo de ia ŝerco: al ŝi tute mankas la larĝa kaj bonintenca rideto, per kiu la atakito kvitanças la farson, de kiu li estis trafita. Plue, — ĉe diablo — kiu estas la kaŭzo? se virino okaze jam iun moke traktas, tio akiras ian malagraban kaj personan sencon aŭ malican intencon. Kaj, trie, al ŝi tio estas tute fremda, ŝi ne taŭgas por tio, ŝi ne kapablas tion: ŝi kvazaŭ ne havus tiun bonintencan atakemon aŭ bonkorecon aŭ, pli mallonge dirite, ŝi ne posedas tiun senbridan kaj efikan gajecon.

Ŝi plezuras ridante, sed ŝi ne konfidas al rido de aliaj; ŝi evitas instigi ŝi mem libervole kaj iniciateme la ridon; ŝi evidente timas, ke tio minacas la respekton al ŝi, kio estas ŝia eterna malforta flanko. Homo, kiu ne kuraĝas esti ridinda, neniam povas esti gaja ĝis la plej eta vejneto. Virino kapablas ridi, jes, tion ŝi trafas; sed la absolutan ŝercon, farson, kiu estas farata por si mem, ekstravagancon, kompletan oferadon al dioj de rido, tion ŝi ne emas.

Plue, eble tio estas reciproka solidareco aŭ malkonfido: se virinoj estas solaj kune, ili ne faras al si reciproke petolaĵojn. Se virino faras iun agan friponaĵon, tio estas ĉiam je konto de viro; se ŝi faras iun aprilan ŝercon, ŝi estas certe direktita al viro. (El tio estas ankaŭ videble, ke virino pli timas virinojn ol virojn.) Sed ankaŭ tion ŝi faras nur tiam, kiam ŝi imitas nin, viraĉojn. En la funkciaro de vivo nur la viroj daŭre subtenas la ridon.

Ne, virino ne estas gaja; kaj se ŝi

*) Rimarko. Karel Čapek, naskiĝinta 1890, doktoro de filozofio, influa ĵurnalisto, vivas en Praha. Li havas tre larĝan talenton. Li verkis teatraĵojn: „La rabisto“, socian utopion „R. U. R.“ (tradukita esperanten), fantazian dramon „La aĵo Makropulos“. Gravaj estas liaj romanoj. (Fabriko de Absoluto, Krakatit.) Tre interesaj estas liaj felietonoj: Italaj leteroj, Anglaj leteroj, kaj aliaj. Kun sia frato Jozefo li skribis alegorian teatraĵon „El vivo de insektoj“.

marŝas tra la vivo „kun rideto sur li-
poj“, tio estas hipokritaĵo: tiu kreaĵo
estas senŝerca kaj serioza kiel la morto.
Ni, ĝuste ni viroj, ni barbuloj, malbe-
luloj kaj obstinuloj, ni estas la rido de
vivo; ni estu konscie fieraj pri tio kaj
dum niaj seriozaj okupoj, ĉe niaj ma-
ŝinoj kaj filozofiaj katedroj kaj plu-
giloj ni memoru pri tio, ke sub nia haŭ-
to ni havas enkudritan la kvadratestre-
kitan vestaĵon de Eterna Arlekeno, kiun
bona Dio estis kreinta al si, por ke sur
la mondo ekzistu ludo kaj farso. Ĉar
ankaŭ tio estis kaj estas Lia saĝa volo.

El la ĉefa: Rudolf Fridrich.

JAN VRBA:

LA MALGAJA KORNICO.

Tiun tagon ĝi forgesos neniam. La
tago estis por ĝi la plej terura el ĉiuj,
kiom da ili ĝi travivis, ĉar ĝi elkoviĝis
en junio kaj nun estis jam fino de no-
vembro. Ĝi vekigis kun stranga sento,
ke io kuŝas sur ĝiaj flugiloj. Ĝi rigar-
dis, sed nenio estis tie... Kontraŭe ĝi
rimarkis, ke ĝi ne povas la kapon iel
taŭge movi. Ĝi levis la kruron, sed
tiu fleksiĝis iel rigide. Timigite ĝi gra-
kis, sed sole raŭka sono eliĝis el ĝia
gorĝo... En stranga sopiro foriri el
tiel terura loko, ĝi eksvingis flugilojn,
sed jam povis okazi, ke ĝi estus falinta
de la branĉo de alta pino al la tero, kiel
matura piro en la fago de sankta Ja-
kobo. Terura ektimo kaj intensa svin-
go per flugiloj, ĝin ankoraŭ iom rekons-
ciigis...

Nur poste ĝi rimarkis, kiel la pejza-
ĝo estas tute blanka kiel muroj de iuj
domoj en vilaĝoj. Tio estis denove tia
nevidita afero...

La korniko pikis ĝin per beko... ĝi
estis mola, sed terure frostis en langon.

Kaj poste venis ekkono, plej malbo-
na el ĉiuj. Anoncis sin malsato. Ĝi do
flugis en regionon kaj fine ĝi rimarkis
sur kampo el ebena blankaĵo elstari
suprojn de sulkoj kaj de terbuloj. —
Ĝi do deflugis, bekpikis, sed la terbulo

estis kvazaŭ el ŝtono... Ĝi bekis la
duan fojon — forrulis erefo de terbulo...

Falis sur la kornikon senmezura fe-
ruro, ĉar ĝi ne povis kompreni, kio do
tra la nokto okazis, ke la tero tiel mal-
moliĝis. Ĝi bekis tien, bekis alien, sed
rezulto estis sama. Ĝi stariĝis rekte,
elflugis kaj denove alteriĝis. Ĉie sole
fantoma kaj senfina blanko... Tiam la
korniko ekkonis, ke ĝi estas kondamnita
morti de malsato...

Senespere ĝi ekkuris tra la terbuloj,
pikis, pikis, sed nenion elpikis. Tiam
kaptis ĝin malĝojo super ĉiuj malĝo-
joj. Ĝi mallevis flugilojn kaj komen-
cis grake plendi...

Poste grakis io alte super ĝi. Ĝi ri-
gardis supren kaj rimarkis en la alto
sian kunulinon. — Kaptis ĝin lasta so-
vaĝa espero. Ĝi suprenflugis al la alia
korniko alten kiel sago — kaj vere bone
ĝi faris. La alia, pli sperta korniko, kon-
dukis ĝin al amaso da sterko.

La duan tagon ĝi jam ellernis,
kiel estas necese vivi, kiam ĉio estas
de elementa vetero premita: je kostoj
kaj malutilo de aliaj. — Ĝi kuniĝis kun
frugilegoj kaj korvoj kaj en laro kun
ili pelis junajn, verde malsaĝajn lepo-
rojn...

Tiam estis jam bone.

Sed tiun kruelan tagon — kvankam
ĝi ekmemorante ankoraŭ hodiaŭ devas
rideti pri sia iama malsaĝo — tiun kru-
elan kaj senesperan tagon ĝi ne forĝe-
sos ĝis sia plej malfrua morto.

El ĉefa: Manka Ginzová.

MIAJ IMPRESOJ DE LA KONGRESO EN PARIZO.

(Daŭriĝo.)

Marde antaŭtagmeze mi faris kun miaj italaj
amikoj aŭtomobila vojaĝon tra Parizo. Ni vi-
zitis la domon de Invalidoj, ĝian muzeon, poste
en la malantaŭa parto la kapelon kun la senpla-
fona kriptoj, kie en la mezo staras la sarkofago
de la Granda Imperiestro. En aliaj kriptoj ri-
pozas kelkaj membroj de familio de Napoleono
kaj ankaŭ kelkaj reĝaj marŝaloj. Krom tio ri-

pozas tie la marŝalo Foch, konata de la granda milito. Poste ni iris al la preĝejo Madelaine konstruita en greka stilo; mi ankoraŭ revenis tien sola, precipe por viziti ankaŭ la proksime situatajn: bulvardon Maiesherbes, straton De Séze, straton Tronchet kaj straton Chauvau Lagarde — ĉiuj nomoj de la advokatoj-defendantoj de la reĝo Ludoviko XVI. kaj reĝino Marie Antoinette, kiuj pro defendado finis ĉiuj sub la gilotino. Maiesherbes, estinta ministro, havis 82 jarojn.

Poste mi traveturis ĉiujn ĉefajn bulvarojn kaj stratojn kaj haltis ĉe ĉiuj vidindaĵoj. Estis tre bela.

Posttagmeze mi ekskursis al Versailles, la fama sidejo de francaj reĝoj. Multon oni povus diri pri la kastelo kaj ĝia historio. La spirito de la pasinteco ĉirkaŭas vin, dum vi trairas la silentajn ĉambrojn kaj la belegajn ĝardenojn, kiuj vidis la plej belan, plej elegantan, plej kavaliran epokon. La ĉambro de pilkludado vidis la komencantan grandan revolucion; dum la milito franco-prusa loĝigis sin en la kastelo prusa reĝo Vilhelmo I. kun sia tuta stabo dum preskaŭ unu jaro, kaj je fino de la milito li lasis sin en la sama kastelo de Versailles, en la Galerio de speĝuloj, proklami kiel imperiestro de la tuta Germanujo. — Francujo ne forgesis tion, kaj kiam post la perdita mondmilito Germanujo la 28. VI 1919 devis subskribi la packontrakton, Clemenceau postulis la subskribon ĝuste en la Galerio de speĝuloj en la kastelo de Versailles...

Vespere okazis la „Vespere de la Literatura mondo“. Komencis ĝin per sia kutima simpatia maniero sro Warnier, salutata de la ĉeestantoj jam ĉe sia nura apero. Poste vidiĝis persono ne malpli simpatia — Raymond Schwarz — kiu konferencis dum la tuta vespero. Lia vizaĝo havis ĉiam la saman serenon, senkulpan aspekton, eĉ kiam li diris la plej grandajn spritaĵojn. — Poste aperis kaj prelegis verkistoj, kies nomoj estas plejparte konataj: Dro Kalocsay, Julio Baghy, Jean Forge, Nikolao Howorka, Dro Olszanger Neuwel, por kiu recitis Baghy, Grenkamp, Jung. La vespero estis tre intima kaj finis per ŝerca ludo kun sro. Baghy. La ĉeestantoj ne volonte disiris, kvankam estis jam noktomezo.

La sekvintan merkredon okazis tuttaga ekskurso al Fontainebleau. 29 grandaj aŭtobusoj transportis nin tien. La 28 forveturis unu post la alia, la 29a — jen oni vidis, ke la aferon aranĝis sperta generalo — generalo Bastien — restis preparita por la malfruigintoj. Kaj — ĉu Vi opinias, ke ĝi nur „restis“ preparita? O, ne,

eĉ ĝi devis forveturi kaj ne nur tio — ĝi alvenis al Fontainebleau tute plena...

La kastelo estis sidejo de imperiestro Napoleono I. kaj enhavas sennombrajn memoraĵojn pri li. Jen lia ĉambro, kie estas branĉo de la saliko, elkreskinta sur lia tombo en Skta Heleno, jen lia lito, lia ĉapelo, kiun li portis dum sia reveno el insulo Elba, jen lulilo de lia amata filo, reĝo de Romo, jen ruĝa salono kun la tavolo, sur kiu li en jaro 1814 subskribis la abdikon, poste la korto en kiu li adiaŭis kun siaj gvardianoj, jen la bela, huffera ŝtuparo, per kiu li lastfoje malsupreniris, por neniam reveni... De la balkono oni vidas la pavilonon sur la lageto, kiun li preferis kaj kie li ŝatis labori, ĉirkaŭ la kastelo la granda arbaro, tra kiu li ofte sola vagadis...

Post la vizito de la kastelo atendis nin la amuza parto de la ekskurso: la pikniko en la arbaro. Kaj ĝi estis efektive amuza. Kiam ni atingis la lokon, la „kuirejo“ estis jam instalita. Nun fariĝis grupoj po 10 personoj, kiuj estis vokataj laŭ numeroj antaŭe ricevitaj. La gvidanto, portanta la numeron sur la bastono, antaŭenmarŝis kun sia grupo kaj ĉerpis la provianton: unu ricevis pladon kun viando, alia pladon kun salato, alia amason da unu metron longaj panoj, kvara skatolon kun manĝilaroj kaj fine du aliaj keston kun trinkaĵoj. Oni aŭdis mallongan ordonon de la gvidanto, oni ekfajfis aŭ ekkantis kaj ekmarŝis en la arbaron, por serĉi taŭgan lokon. Poste sekvis la taĝmanĝo. Gajaj scenoj okazis, oni bonege sin amuzis. Post la manĝo oni kolektis ĉiujn manĝilarojn kaj eĉ ĉiujn restaĵojn kaj paperojn, por ke nenio restu en la herbo, kaj portis ĉion reen al la kuirejo. Nun oni estis liberaj kaj amuzis laŭplaĉe, promenis, sidis en grupoj aŭ duope kaj babilis, oni ripozis, fotografis kaj ludis ĝis la horo de la forveturo. Reen ni veturis sufiĉe longe tra la vasta arbaro kaj venis hejmen en plej bona humoro.

Vespere ne estis oficiala programo. Mi estis kun miaj amikoj en la fama Folies Bergères.

jaudon antaŭtagmeze ni reprenis nian vagadon tra la urbo ĝis tagmezo. Posttagmeze estis interesa parto de la kongresa programo: vizito al la instituto Pasteur. Ni kunvenis en la granda amfiteatro, kiu estis sufiĉe nehigiena. Malmultaj fenestroj devis resti fermitaj, ĉar okazis kinoprezentado kaj la du pordoj ne sufiĉis por enlasi necesan kvanton da aero. La varmego, pligrandigita per amaso da homoj, estis momente netolerebla. Du personoj svenis, kelkaj foriris ankoraŭ ĝustatempe. Bonvenigis nin maljuna profesoro Calmette, la konata ĉitrovinto de la kontraŭtuberkuloza serumo, per ĉar-

maĵ vortoj dankante por nia intereso kaj por la florkrono kuŝanta sur la katedro, per kiu ni honorigis la memoron de Pasteur. Prof. Bujwid tradukis iliajn vortojn kaj aldonis kelkajn detalojn el la vivo de Pasteur, kies disĉiplo kaj amiko li estis. Krom tio li memorigis alian grandan eltrovinton, nome Dron Ramon, kiu eltrovis serumon kontraŭ difterio kaj kies familio ĉeestis la kunvenon. Poste parolis D-ro Poncet pri la faka flanko de fabrikado de serumo kaj vakcinado. Sekvis filmo montranta, kiamaniere oni atingas serumon kontraŭ la rabio. Oni infektas vivantan kuniklon traborante ĝian kranion kaj enŝprucante en ĝian cerbon infekto de rabio. La kuniklo post nelonge mortas je rabio, oni per sekcio deprenas el ĝia cerbo la mjelon, sekigas ĝin, distranĉas kaj miksa kun certa kvanto da akvo ĝi donas serumon kontraŭ rabio. Kiom da homoj dankas ilian vivon al tiuj ĉi tri viroj: Pasteur, Ramon, Calmette por iliaj geniaj eltrovaĵoj!

La dua parto de la filmo temis pri la unua provo de Pasteur, tiam ankoraŭ ne komprenata kaj malatentata — pri vakcinado kontraŭ rabio, kiu plene sukcesis kaj estis komenco de lia kariero. Malgraŭ tio Pasteur restis ĉiam modesta laboranto ĝis kiam li atingis la celon de siaj klopodoj, nome, kiam estis al li ebligite fondi la nunan instituton, kiu portas lian nomon.

Post la filmprezentado ni vizitis la tombon de Pasteur en la kapelo de la instituto mem, kie li ripozas kune kun sia edzino.

Ni vidis ankaŭ la grandan nombron de kunikloj kaj musoj, kiuj ĉiuj estas kondamnitaj al terura morto pro rabio — sed oni devas konsoli sin, ke per ilia morto oni savas la vivon de multaj homoj.

Per tio finiĝis la vizito de la instituto Pasteur, kiu estis sendube unu el la plej interesaj partoj de la kongresa programo.

Kio ne plaĉis al mi ĉe tiu vizito, estis la senĉesa, bana aplaŭdo dum la paroladoj kaj dum la filmprezentado. Ĝi ne nur treege malfaciligis la aŭskultadon, sed rezultis ofte eĉ ridinde. Tiel ekzemple, kiam prof. Calmette dankis por nia atentemo por la florkrono, per kiu ni honorigis la memoron de Pasteur — oni aplaŭdis! — Kiam je fino de la filmo venis loko, kie oni diras, ke Pasteur mortis — oni aplaŭdis! Ĉar Pasteur mortis?!

De instituto Pasteur ni revenis al la kongresejo por partopreni en la somera universitata prelegon de Gabriel Chavet pri „Modernaj tendencoj de dancarto“ kun prezento de dancistinoj de la lernejo Irène Popard. Oni baldaŭ entute forgesis, ke oni partoprenas nur „prelegon“ kaj

ne veran dancprezentadon. Pro tio ankaŭ sro. Warnier post la fino tute prave nin demandis — „Ĉu plaĉas al Vi la somera universitato?“ Respondo estis ara, entuziasma „Jes!“

Je la 20.30 horo vespere ni forveturis ŝipe al St. Cloud, Tiel ni konatiĝis ankaŭ kun la rivero Seine, kies trankvilaj ondoj nin portis. Post unu horo ni atingis la celon kaj elŝipiĝis. En tute proksima bela restoracio estis preparitaj por ni lokoj sur terasoj. Bedaŭrinde komencis pluvefi, tial ni devis eniri. Sed estis tro malmulte da tempo inter la alveno kaj forverturo kaj kiam ni fine havis lokon kaj eblecon ion mendi, ni jam devis denove foriri por enŝipiĝi. Estis damaĝe.

Sekvintan tagon estis vendredo — la fino de la kongreso alproksimiĝis. Je la 11. horo ni estis akceptitaj en la urbodomo. En la granda salono atendis nin la urbestro kaj kiam ni sidiĝis, li alparolis kaj salutis nin per simpatiaj vortoj. Lia parolado estis tradukita en esperanto. La reprezentantoj de la kongreso al li dankis. Poste oni ĝvidis nin tra aliaj salonoj de la urbodomo, ne malpli belaj kaj luksaj. Ni restis pli ol unu horon.

Posttagmeze okazis denove interesa prelego ĉe la somera universitato, tiu de prof. D-ro Bruno Migliorini de la reĝa universitato en Roma, pri „Artefaritaj elementoj en la naciaj lingvoj“. Poste ni partoprenis la rapide kunvokitan kunvenon de la membroj de UEA, sekvon de la antaŭa kunveno, dum kiu estis per konata maniero nuligita la kontrakto de Helsinki. La defaloj de tiu ĉi kunveno estas al la plejparto de la samideanoj jam konataj. Ĝi daŭris sufiĉe longe kaj estis tre vigla, eĉ iomete batalema. Malgraŭ certa interkompreniĝo kaj espero je fina bona rezulto, mi havas la impreson, ke tamen okazis io kio ne devis okazi. Ni do esperu je la plua bona evoluo de la tuta afero.

Sekvis la lasta vespero — la internacia balo. La nombro de partoprenantoj estis granda — mi opinias, ke ĉeestis ĉiuj kongresanoj. La granda salono ne sufiĉis por la dancantoj. Dank al Dio, ke estis ankaŭ multaj, kiuj en tiu varmeĝo preferis ne danci kaj nur rigardis, aŭ promenis, babiladis en angulo de la restoracio. Inter ili apartenis ankaŭ mi. Kelkfoje mi tamen iris danci, sed volonte revenis al miaj amikoj.

La balo komencis per polonezo. Kiel unua paro eliris fino Lidja Zamenhof kun sro. Warnier, la dancon devis aranĝi nia samlandano sro. Krysta, sed pro granda amaso de la partoprenantoj ĝi tute ne estis ebla kaj restis nur ĉe la promenado. Sed eĉ tio estis tute bela.

Naciaj kostumoj estis malmultaj (ĉefa nur

unu sola) kaj malfrue oni demandis nin, kial precipe ni Ĉeĥoslovakoj ne alportis niajn belajn kostumojn. De tempo al tempo aperis apud la orkestro sro. Raymond Schwarz kaj lia apero mem sufiĉis, ke ĉiuj ĉirkaŭu lin kaj aŭskultu. Generala rido akompanis liajn vortojn.

Je la noktomezo sro Warnier anoncis, ke la muziko forkondukos nin el la salono kaj konsilis al ni sekvi ĝin kaj lasi nin surprizi. Kompreneble ni estis tre scivolemaj kaj volonte pare sekvis en bela ordo la muzikon, kiu ekludante, ekmarŝis. Oni kondukis nin tra la domo kaj fine ni venis en teatran salonon, kie oni prezentis — propagandan filmon pri la venonta kongresurbo Kolonjo (Köln). Tiel ni — sidante en la nuna kongresejo — vidis jam la venontan kongresejon. Ĉu ni post unu jaro retrovos nin same kontentaj kaj bonhumoraj? Ni esperu! Kaj rezulto de tiu ĉi espero estis proksimume 80 aliĝoj, kiujn la ĉeestantaj Kolonjanoj kolektis.

Post la prezentado de la filmo ni revenis kaj daŭrigis en la danco kaj amuzado. Neniu laciĝis — je la 4a horo matene oni amuzis sin same kiel ĉe la komenco de la balo. Mi foriris kun miaj amikoj je la 4a horo, sed kiel ni poste aŭdis, oni restis ankoraŭ multe pli longe. Bedaŭrinde, ke ju pli alproksimiĝis la mateno, despli oni devis pensi pri la adiaŭo, ĉar sabate antaŭtagmeze estis jam nur la solena fermo de la kongreso. Lastan fojon alparolis nin sro. Warnier per sia simpatia maniero. Li prezentis al ni la modestajn membrojn de la LKK, kiujn oni devis altiri, por ke ili sin montru. Oni sincere aplaŭdis ilin, sro. Warnier publike al ili dankis kaj dankis ankaŭ al ni, kiuj helpis al la bona sukceso de la kongreso. Eksonis multfoja „Ĝis revido en Kolonjo“ — kaj ĉio finita. Je tagmezo oni fermis la kongresejon.

Multaj samideanoj ankoraŭ restis kaj tiujn oni povis dumtage kaj vespere trovi en la kafejo „Rotonde“ apud la kongresejo. Oni revenis ĉiam ankoraŭ al la malnovaj karaj lokoj...

A. Tarantíková.

Přihlásil jste se do Svazu?

Roční příspěvek 16 Kč.

Knižní premie zdarma.

Přihlášky na adresu:

Otto Sklenčka Hradec Králové 628a.

GEINSTRUISTOJ!

Pro korespondado por vi kaj viaj ĝelernantoj kun ĉiuj landoj anoncu vin ĉe:

f-ino Julie Šupichová, Praha II.,
Malá Štěpánská 6.

La perado estas senpaga; sed aldonu poŝtmarkon por simpla letero en Ĉeĥoslovakio.

AL LA ĈEĤOSLOVAKA INSTRUISTARO!

(Rilatas korespondo-peradon)

Karaj gekolegoj,

la Internacia Asocio por mondhelpingvo (IALA) en New York subtenas internacian korespondo-oficejon kun la centro en Berlin, Germanujo.

Perata estas korespondado en Esperanto (kaj okaze ankaŭ en aliaj lingvoj) inter ĝeinstruistoj kaj ĝelernantoj de ĉiuj landoj.

Ĉiu el vi, kiu serĉas korespondadon por si mem aŭ por siaj ĝelernantoj, anoncu sin ĉe:

f-ino Julie Šupichová, Praha II.,
Malá Štěpánská 6.

kiu estas perantino por Ĉeĥoslovakio.

Kiam la perantino ricevos vian anoncon ĝis la 10-a de ĉiu monato, ŝi povas sendi al vi la disponeblajn adresojn jam post mallonga tempo.

La perado estas senpaga. Sed bonvolu aldoni al via anonco poŝtmarkon por simpla letero en Ĉeĥoslovakio.

La anonco enhavu: informojn pri (rilate al instruistoj) profesio, t. e. en kia speco de lernejo la kolego instruas — aĝo — deziritaj interrilatoj — temoj — specialaj deziroj — kompleta adreso; (rilate al ĝelernantoj) ankaŭ speco de la lernejo, nombro de la ĝelernantoj, kiuj deziras korespondi kaj adreson de la instruisto, kiu aranĝas la korespondado-aferon.

Mi rekomendas al vi, diligente uzi la servojn de nia Korespondo-Oficejo kaj promesas al vi, fari mian plej bonan, por havigi al vi konvenajn korespondantojn. Ju pli vi partoprenos nian entreprenon, des pli mi kapablos helpi vin.

Do, bonan sukceson kaj sinceran saluton!

Marta Moelke

sekretariino de Kunlaborado de IALA New York
Berlin- Steiglitz Stündestr. 12 Germanujo.

PACIFISMO.

S-ino Martha L. Root en Praha.

Jam kelkajn monatojn restadas en Praha kaj sukcese, sed tute silente laboras tie ĉi la usona ĵurnalistino S-ino Martha L. Root, konata mondvoyaĝanta propagandistino de Esperanto, pacifismo, moderna internacia edukado k. s., kio estas la ĉefaj principoj de la bahaa movado de ŝi heroldata. Ŝiaj antaŭaj paroladoj el kiuj multaj estas faritaj per radio, aŭ en universitatoj, kaj kelkaj anglalingvaj artikoloj pri Ĉeĥoslovakujo, Prezidanto Masaryk, la Konferenco Daco per Lernejo (1927) k. a. nian nacian kaj ŝtatan favore rilatantaj publikajoj malfermis al ŝi multajn eblecojn favore akceptigi ŝian laboron en por ni ŝatindaj medioj. Ni mencias:

La 22. IX. parolado „Novaj principoj en internacia edukado“ (interŝanĝo de studentoj kaj profesoroj ktp.) en Prague English Grammar School (angla liceo en Praha), prezidis kaj tradukis la direktoro de la liceo, Prof. Klotzner. S-ino Root eble dum dek minutoj parolis pri Esperanto, ĝia helpa rolo en la edukado, pri sia intervjuo pri E. kun Prez. Masaryk kaj montris sian insignon ŝin helpantan dum mondvoyaĝado.

La 30. IX. „Společenský klub“ Praha-Přikopy aranĝis festkunvenon por anglalingva parolado de S-ino Kazimiera Illakowicz, pola poetino, je la temo „Why Enemies are lovable“ (laŭvorte: kial malamikoj estas amebaj). La estraro invitis S-inon Root inaŭguri la paroladon. Ŝi parolis pri internacia kunlaboro, sed ĉefe pri Esperanto, UEA kaj montris la jarlibron de la Esperanto-movado.

La 12. XI. kunvenon de amikoj de bahaismo partoprenis ankaŭ eksterprahaaj gastoj (S-ino J. Wurmová, Brno, k. a.) kaj ĉefoj de etikaj movadoj. Interalie oni parolis pri la kongreso en Parizo kaj legis paroladon de S-ino Root „Bahaismo en Ĉinujo“ tradukitan el Esperanto.

La 15. X. parolado kun mencio de E. en Societo por Studi Mistikon en Praha, prezidata de Dro Bedrniček.

La 14. XI. parolado en YWCA, Praha pri „Internacia edukado de virinoj“ kun granda parto pri Esperanto. La paroladon aranĝis F-ino Pavla Molnárová (fratino de esperantistoj, mem neesperantistino).

La 20. XI. S-ino Root akceptis inviton paroli per radio memore pri Charlota Masaryková, la mortinta edzino de Prezidanto Masaryk. Kelkaj el la multaj notoj pri la parolado en en- kaj eksterlandaj ĵurnaloj menciis S-inon Root kiel esperantistinon.

S-ino Root plenumis en tiu tempo ankaŭ alian por ni interesan komision: esperantistoj el San Francisko petis ŝin kiel sian amikon sendi esperantan materialon pri Ĉeĥoslovakujo por publika ekspozicio kaj parolado pri nia lando. Siemerite ankaŭ estas eldonita ĉe Orbis, Praha en la ĉeĥa traduko de Pavla Moudrá la angla verko de esperantisto J. E. Esslemont „Baha'u'llah kaj la Nova Epoko“ (libro konata al ni laŭ la esp. traduko de Lidja Zamenhof), kiu sur multaj paĝoj parolas pri Esperanto kiel unu el la nepraj rimedoj por internacia amikiĝo de la nacioj. En intervjuo, demandite pri sia opinio koncerne nian movadon, la tradukintino esprimis laŭdon pri la laboro kaj internacia organizo de esperantistoj, pri UEA kaj diris, ke la jarlibroj kaj la gazetanguloj por internacia korespondado en E. estas unu el la aktivaj vojoj al mondpaco, tiom serĉataj de teoriaj pacifistoj. —

Por la utila laboro de nia usona samideanino ni ŝuldas multan dankon!
VER.

BLINDULOJ.

Cent jaroj de la Blindul-Instituto de Klár en Praha.

En la komenco de aŭtuno nunjara festis la Blindul-Instituto de Klár en Praha sian centjaran ekziston. Tiun ĉi eminentan jubileon partoprenas la esperantistoj kun ega intereso, ĉar inter la muroj de tiu ĉi instituto rolis nemalgranda, grava parto de nialanda kaj eĉ internacia historio de la Esperanto-movado. Kiel ni menciis jam en artikolo en la antaŭa n-ro de LP, estas fondita tie ĉi en 1904 la nialanda blindulesperantista movado per tio, ke ĝia pedagogia direktoro, la ĉeĥa muzikkomponisto K. E. M. Macan, mem eklernis kaj samtempe instruis Esperanton en sia blindulternejo. En 1921 la instituto gastigis la Unuan Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj. Tiu ĉi fakto estas precipe grava, ĉar la instituto gastigis la kongreson kaj la kongresanaron kun malofta gastamo tute senpage, ĉar ĝi per tio helpis fari la komencon de longa, espereble senfina serio de pluaj ĉiujaraj tiaj kongresoj en

aliaj landoj. Krom mallonga interrompo dum la mondmilito la instruado de Esperanto en diversaj kursoj okazis de post 1904 ĉiujare. Dum kelkaj jaroj, kiam ekzistis en la instituto speciala tipo de blindulmetia lernejo, la lingvo estis instruata eĉ devige.

Okaze de la jubileo estas eldonita belega grandformata ilustrita almanako, kiu rakontas la interesan historion de la familio Klár kaj de la instituto, kaj sur kvar lokoj mencias la suprajn faktojn krom tiu, ke flegatoj de la instituto partoprenas internaciajn blindul-esperantistajn kongresojn (Budapeŝt).

Estas menciinde, ke la granda biblioteko de la instituto enhavas esperantan fakon kun multnombraj binditaj ekzempleroj, el kiuj multaj estas kopiitaj de la flegatoj en brajla stenografio originala por Esperanto.

Tiu ĉi poresperanta laboro estas nur malgranda parto de la tre bonfara humana agado de l'Instituto de Klár en Praha. Pro ĝi ni dankas, kaj por ĝia daŭro mi tutanime bongratulas la instituton — ĝian estraron kaj la flegatojn.

En la kadro de la jubileaj festoj okazis solena malfermo de nova hejmo de la instituto en antaŭurbo Krč. La solenon kun riĉa artoplena programo, prezentita nur de geflegatoj, partoprenis eminentaj fakuloj de la blindula zorgo, kaj ankaŭ nombro de samideanoj. Ni ĝojis konstati, ke inter la plej kapablaj aktoroj (kantantoj, muzikantoj, deklamantoj) unuajn lokojn okupas absolventoj de la Esp-kursoj; el ili ni nepre devas nomi la junan, multpromesan poeton J. Blanký, kiu estas neniu alia ol nia, Esperanton majstranta samideano Fr. Prášíl.

VER.

* * *

Baťa kaj ĵurnalisti. Al Baťa, la plej granda ŝuisto Eŭropa, venis vizitanto, kiu kun li parolis pri ĵurnalistoj.

„Vera ĵurnalisti“, diras Baťa, „komprenas ĉion, sed kapablas nenion“. La vizitanto protestis kontraŭ tia opinio kaj atentigis, kiom da ĉefministroj en la nuna Eŭropo estas eks-ĵurnalistoj. „Tio estas ebla“, rediris Baťa, „ĉefministro el estinta ĵurnalisti, jes, sed ŝuisto el ĵurnalisti — neniam!“

Boťoj kaj kravatoj. Kiam Baťa estis elektita kiel urbestro de Zlín, li igis sin fotografi. Tio estas lia konata bildo, kun ĉapelo en mano. La foton Baťa montris al sia edzino: Kompreneble — diras la edzino — la kravatton vi havas kiel ordinare, malrekte. — Sed Manjo, neniu brava viro havas laŭorde ligitan kravatton. Tiam scias ligi sole hochstapler'oj.

Cu vi scias, ...ke Francio estas unu el la kvar ŝtatoj eŭropaj, en kiuj la virinoj ne havas balotrajton?

...ke Francio estas unu el la tri ŝtatoj, kie la edzino laŭ siaj rajtoj egalas al neplenaĝuloj? Ke ŝi estas civitane senrajta?

...ke ankaŭ virino, kiu antaŭ sia edziniĝo okupis iun oficon aŭ gvidis komercon, povas daŭrigi en tio post sia edziniĝo sole kun oficiale registrita konsento de sia edzo?

...ke tiom pli bezona estas tiu ĉi konsento, se ŝi volas dediĉi sin al memstara mongajna agado post la edziniĝo?

...ke sen konsento de ŝia edzo ne validas ŝia publikrajta nek privatrajta devo-ligo, ke ŝi ne povas fondi bankan konton, nek ricevi pasporton, nek akcepti heredaĵon aŭ donacon, nek preni prunton aŭ garantion?

REDAKCIA.

Ni metas la lastan kajeron de la jarkolekto 1932 en la manojn de niaj abonantoj.

Pro la morto kaj malsanoj en la familio kaj granda okupiteco profesia okaze de sia nova posteno, la redaktoro ne povis aperigi la numeron akurate. La homoj de bona volo komprenos, ke super la plej bonaj intencoj iam intervenas cirkonstancoj ekster povo de homa individuo. Nur kiu nenion spertis aŭ kiu spertinte mem, tamen ne volas kompreni, uzas en tiu situacio la okazon por akraj riproĉoj.

Dor esti garditaj kontraŭ similaj okazoj, ni entreprenis por la venonta jarkolekto aranĝojn sekve de kiuj la gazeto ne estos dependa de unu sola persono ankaŭ koncerne la aperon.

La preparoj por la regula aperado dum 1933 estas jam faritaj. La 1-a n-ro aperos post nelonge, kaj enhavos plibonigojn, kiuj kontentigos espereble ĉiujn niajn amikojn. La pluaĵaj numeroj baldaŭ reakiros la laŭtempecon.

Slovník obchodně-technický, účetní a daňový. Sešit č. 19—21/V. obsahuje: Lůžkové vozy - Lyže - Má dáti - Má dáti a dal - Majetkové delikty - Malířství - Maloobchod - Malversace - Manifestační přísaha - Manko - Manželství - Margarin - Marmelády - Maso - Med, medovina - Měď - Medaile - Mechanici - Mechanické sace administrativy - Měna - Metody výrobní a obchodní - Metrická soustava - Mezinárodní sýky - Meziřimní bilance - Mincovníctví. Expedují Tiskové podniky Ú. S. Č. P., Praha I., Masarykovo náměstí. 4. Cena sešitu Kč 19.50.

LINGVA FAKO

PŘEKLAD 35. TEXTU.

Překlad tohoto textu nám zaslali: Adam Aug. Česká Skalice, Baculík Ján Zvol. Slatina, Kohoutek Boř. Praha, Mňačko Jos. Tišnov, Novák Lad. Přívoz, Odehnal Ant. Horní Suchá, Pražák V. Kosmonosy, Rosypal Val. Háj, Štěpán Al. Hostivař. Z nejlepších prací vylosován byl překlad p. Adama Aug., jemuž zašleme knižní odměnu.

Traduko.

Nia celo¹⁾ estas nenio malpli granda²⁾ ol konstrui tian arton vivi³⁾ kaj tian idearon pri la mondo,⁴⁾ kiuj ne subpremas la sentojn, sed — kontraŭe — ilin kulturadas, ilin plifortigas,⁵⁾ klopodas⁶⁾ ilin plimultigi.

La plena, forta, sunriĉa⁷⁾ vivo estas sufiĉe bona por ni. Kontraŭ la eklezia kulturado de pentoj, malĝojoj,⁸⁾ timoj,⁹⁾ verma moralo ni metas¹⁰⁾ la sentojn pozitivajn, la sentojn,¹¹⁾ kiujn ni opinias¹²⁾ sole sana manifestiĝo¹³⁾ de la dia principo en ni.

Poznámky.

1. Těž: Oni celas, ni celas. Temas por ni pri... („Temas“ bez zájmena, podobně jako je: „pluvas, tondras“). Viz též Frazologio, str. 97 v č. 7—8 a str. 111 v tomto čísle.

2. Těž: malpli grava.

3. tež: vivarton, scion de vivado (životní umění — umění žiti).

4. tež: mondkoncepto

5. zesilovati něco = ĉiniri něco silným, silnějším = igi ion forta, fortiĝi ion nebo igi ion pli forta, plifortiĝi ion. Plifortiĝi la voĉon = zesiliti hlas = igi, fari la voĉon pli forta = igi, fari, ke la voĉo estu pli forta.

Podobně: rozhojnití = učiniri něco hojnějším = igi ion pli multa = plimultiĝi ion.

Kdežto plifortiĝi = státi se silnějším = igi pli forta = zesileti, zesiliti. Jeho hlas zesilil = jeho hlas stal se silnějším = lia voĉo plifortiĝis.

Podobně: plimultiĝi = státi se hojnějším = igi pli multa = rozhojnití se, rozinnožití se

6. nikoli: rigardi (= hleděti ve smyslu dívati se). Těž: celas, zorgas.

7. tež: sunbrila. Obrat: La plena... sunplena vivo je výrazově těžkopádný, nedoporučujeme. Esperanto skytá dosti výrazových prostředků a není tedy nutno opakovat ve slo-

ženině slovo plena, které se v této charakteristice již jednou nalézá.

8. tež snad: bedaŭroj

9. tež snad: funebro

10. Meti je sloveso, které znamená učiniti, aby něco bylo někde, buď v nějakém místě nebo v nějakém stavu. Je velmi pohodlné k přeložení mnoha českých sloves stejného významu: meti manĝaron sur la tablon (dáti příbor na stůl), meti vinaĝron en la salaton (dáti octa do salátu), meti paperon en sian poŝon (strčiti papír do kapsy), meti korpon en la teron (uložití tělo do země), meti gardiston ĉe la pordon (postavití stráž ke dveřím), meti iun en embarason (uvéstí někoho do rozpaků)

Almeti: al tiu antaŭfimo sin almetis alia, pli ĝrava (k té předtuše se přidala jiná, vážnější)

Demeti: demeti la veston (svléknout se), demeti ringon de sia fingro (sejmoutí prsten s prstu)

Elmeti: elmeti libron ĉe la montrofenestro (vyložití knihu do výkladu), elmeti al la sunaj radioj (vystavití slunečním paprskům), sin elmeti al mokado (vydatí se posměchu)

Submeti: sin submeti al la plimulto (podříditi se většině), submeti proponon al atenta konsidero (předložití návrh pozornému uvážení).

V daném místě překladu možno užiti tež slovesa starigi = igi, ke io staru (postavití = učiniti, aby něco stálo). Podobně i jinde přípona -igi se slovesem znamená učiniti, aby někdo nebo něco jiného konalo činnost vyjádřenou kmenem: bruli = hořeti, bruligi = páliťi, devi = měti, musiti = devigi = učiniri, aby někdo měl nebo musil = nutiti = devigi iun. Ĝoji = radovati se — ĝojigi iun = ĉiniri, aby se někdo radoval (fari, ke iu ĝoju) = potěšiti někoho, rozradostniti někoho. Halti = zastavití se — haltigi la vagonaron = fari, ke la vagonaro haltu = zastavití vlak. Veni = přijiti — venigi = učiniri, aby někdo nebo něco přišlo: venigi la kuraciston = fari, ke la kuracisto venu (zavolatí lékaře), venigi tiun libron = fari, ke tiu libro venu (objednatí knihu). Sendi libron = poslatí knihu — sendigi la libron = fari ke iu (la librovendisto) sendu la libron (dát si poslat knihu). Presi la libron = tisknoutí knihu — presigi la libron = fari ke iu (oni, la presejo) presu la libron (dát knihu do tisku). Abonu kaj abonigu! Předplatte se a získávejte předplatitele (abonigu = faru ke oni (iu alia, multaj aliaj) abonu!

11. Vynecháte-li opakované slovo „sentojn“, nic se zhruba na smyslu věty nezmění; autor však slovo opakuje k zesílení výrazu, proto je v překladu opakujeme též. Nahradití slovem „tiujn“, gramaticky sice správným, ale méně výrazným, nedoporučujeme.

12. též: ni konsideras

13. též: esprimiĝo. — Věta může znít též: ...kiujn ni opinias kiel sole sanan manifestiĝon.

36. TEXT K PŘEKLADU.

Historika nádražní.

Přijede tuhle rychlík do České Třebové a všechno se vrhne k párkům a pivu. Jen jednomu pánu v posledním voze se nechce ven, čeká tedy, až spatří na peronu potulujícího se klučinu. „Františku“, povídá mu srdečně, „tu máš pěťikorunu a skoč mi pro párek s houskou. Za odměnu si můžeš taky koupit párek a housku.“ Kluk poskočí, ale chvilku to trvá, než ho pohodlný pán opět uzří. Zdaleka ho vidí, jak do sebe láduje párek s houskou. A když František dojde před vagon a spolkne poslední sousto, vyrazí ze sebe: „Tady máte dvě koruny padesát zpátky — oni tam měli už jen jeden!“

Při překládání mějte na mysli, že překládáte veselou historiku. Hleďte, aby překlad byl lehký, vyjádřený řečí, jakou se v takových případech mluví.

Práce zašlete co nejdříve. Z nejlepších prací vylosovanou odměníme knihou.

FRAZEOLOGIO

La unua serio de elektitaj ĉefaj frazoj kaj parolturnoj, kiuj iam kaŭzas embarason ĉe komencantaj esperantistoj, publikigita en la pasinta nro trovis grandan kontenton inter niaj legantoj. La redakcio plenumos la deziron esprimittajn en multaj leteroj, kaj daŭrigos regule. Por la alsenditaj kunlaboraĵoj ni dankas kaj ree akcentas, ke tiu ĉi frazo estas des pli ampleksa kaj funda, ju pli da malfacilaj temoj ni sukcesos kolekti kun helpo de niaj legantoj. — La ĉefaj parolturnoj ni ne kribras laŭ ilia lingva rajtigiteco, sed kolektas ĉiujn, kiujn oni trovas en la skribo aŭ en la parolo, sen atento pri tio, ĉu la plej korekta ĉefa lingvo ilin permesas aŭ ne.

II.

má peněz jako smetí li havas plii da mono ol bezono...

li dronas en mono

li falis en mizeron

konstliti kuracis(on)

oni kutime diras

la babilado (konversacio) turniĝis al...

li (obstine) persistis ĉe (pri) sia opinio

li estas multon travivinta

li havas altajn aspir-ojn

ne estas eviteble, vi devas...

tio kondukos al nenio bona

li komencas la sesan jaron

fari amikan servon al iu, fari amikaĵon al iu

resume

prefere mi evitas lin liaj spritaĵoj estas troaj

ekzistas nenio pli bona (bela, agrabla ktp.)

en antaŭaj tempoj de l'kapo ĝis la piedoj

tio postulas kurajoŝon la afero marŝas bone, ... progresas bone, ... prosperas.

ĝenra bildo

kompleta verkaro

nomu min malsaĝulo, se...

havi kompaton al.. konsenti kun...

senĉasa sezono

plene venki

perdi ion

naskiĝi

ekkapti ideon

mi restos ĉe vi ĝis la dimanĉo

mi venos al vi nur dimanĉe

mi ne venos al vi antaŭ la dimanĉo hm.

upadl ve psi

poraditi se s lekařem

řikává se

přišla řeč na...

postavil si hlavu

ten toho má mnoho za sebou

ten míří vysoko

nic nepomůže, musíš.. není vyhnutí...

z toho nepojde nic dobrého

jde mu na šestý rok

prokázatí přátelskou službu někomu

v celku vzato

raději mu jdu s cesty

šel velmi daleko ve vtipkování

nad to není

v dřívějších dobách

od hlavy až k patě

k tomu patří odvaha

ta věc jde dobře

žánrový obrázek

sebrané spisy

ať jsem Tatar, jestliže...

mítí srdce s někým

doba hájení

poraziti na hlavu

přijítí o něco

přijítí na svět

přijítí na myšlenku

zůstanu u vás až do neděle

přijdu k vám až v neděli

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA XIX. URALSKÉ NÁM. 447.
NUMERO 48. - FEBRUARO 1932.

LA ĜENERALA KUNVENO DE ĈAE okazos en Hradec Králové la 19. Marto (ne la 25. 3.)

Informoj:

Otto Sklenčka Hradec Král. 628a.

LA VII. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis merkrede la 9. Novembro 1932 en Praha, kafejo Louvre. — Ĉeestis: Echtner, Ginz, Herzigová, Janda, Dr. Pítlík, Staněk, Fr., Staněk Mir., Šustr, Tarantíková, Votrubec. — Senkulpigis sin Hromada kaj Slavík. — Prezidis Dr. Pítlík, protokolis Tarantíková. — Leterojn sendis Dro Kamaryt kaj Sklenčka. — Daŭro de 20.30 ĝis 23.45 horo. — El la protokolo:

Propaganda semajno. Informoj pri ĝia aranĝo venis al ni el Brno, Prostějov, Plzeň, Bakov, Bzenec, Praha. — Petoj pri informoj venas senĉese al la Sekretariejo. — Afiŝoj de ni eldonitaj estas preskaŭ disvenditaj, restas iom pli ol 100 ekz (sur maldika papero).

Fondaĵo por instalí Oficejon de ĈAE. Nia prezidanto ellaboris proponon pri ĝia statuto. La propono estis principe akceptita, detaloj estos fiksitaj en iu el la venontaj kunvenoj.

Vojaĝo de S-ro Bleier. Nian cirkuleron respondis favore: Bratislava, Brno, Hradec Králové, Mladá Boleslav (Bakov), Liberec, Semily, Plzeň, Praha.

Konferenco en Lázně Bělohrad. Nia prezidanto sendis leteron, en kiu li menciis la vidpunkton de ĈAE al la reorganiza problemoj kaj laboron de ĈAE en la nuna jaro. La konferencon partoprenis du membroj de la komitato, s-oj Sklenčka kaj Šustr, kiu prezentas mallongan raporton: Partoprenis 46 p. el 18 lokoj (Bělohrad 9, Pardubice 4, Hradec Král 4, Borovičky 5, Lhota Šárovcová 2, Praha 2; po 1 el Kutná Hora, Nymburk, Dvůr Králové, Lito-měřice, Petrovice, Mnichovo Hradiště, Česov, Holovousy, Bříšťany, Hořice, Nový Bydžov, Bakov). Prezidis dir. Horáček el Kutná Hora. S-ro Šustr kiel delegito de ĈAE parolis pri la kursoj, kiujn aranĝas Esp. Klubo Praha kaj pri la 30jara jubileo kluba. La venonta regiona kunveno okazos en majo en Bernartice apud Trutnov.

Regulaj konferencoj. La komitato pensos pri aranĝado de regulaj konferencoj en diversaj lokoj de la respubliko.

Ligo de saksaj esperantistoj havis la 30. 10. konferencon en Radeberg. Laŭ deziro de ilia prezidanto ni sendis por la partoprenantoj 150 gvidfoliojn Praha kun bondeziroj.

La ĉeĥoslovakano n-ron de la Literatura Mondo preparas en kontakto kun la prezidanto S-ro Ginz, kiu donas al la kunveno informon pri diversaj detaloj.

Ilustrita gvidlibro tra linioj de ĉsl. ŝtataj fervojoj estas eldonita de la fervoja ministerio. La tradukon prizorgis laŭ mendo de la ministerio S-ro Slavík.

Propagandan filmon pri la kongresa urbo Köln proponas al ni ICK senpage, nur por pago de transportkostoj, por tempo 1-15 Majo 1933. Ni skribos pri tio al niaj kluboj.

Radiokurso en Brno gvidas S-ro Kilián, profesoro en Třebíč.

Studenta Sekcio. S-ro Řebíček ne akceptis funkcion de la sekciestro. La kunveno prokrastas nomi alian estron.

Gvidfolio Praha. La vojaĝa oficejo Ĉedok ricevos laŭ sia peto 200 ekz. por siaj eksterlandaj filioj. Ankaŭ aliaj interesatoj ricevis ekz.

Varbado por ĈAE. Almeti ĈAE-aligilojn al la novembra nro de Tribuna eldonata de S-ro Sklenčka kaj pagi ilin el Asocia kaso estis aprobite.

Korespondantoj de ĈAE. Tiu ĉi aranĝo ne montriĝis sukcesa. La funkcion povas plenumi delegitoj de UEA kaj korespondantoj de la gazetoj.

Klubo en Kolín raportas pri sia nunjara laboro.

Muzeo Vrchlický. Laŭ deziro de prof. Lukáš ĈAE donacis unu ekz. de la esp. traduko „Nokto en Karlův Týn“ por samtempa ekspozicio.

LA VIII. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis merkrede la 14. Decembro 1932 en Praha, kafejo Louvre. — Ĉeestis Herzigová, Janda, Dr. Pítlík, Slavík, Staněk Frant., Staněk Mil., Šustr, Votrubec, Senkulpigis sin Hromada kaj Tarantíková. — Prezidis Dro Pítlík. — Protokolis

Slavík. — Leteroj venis de Dro Kamaryt, Skleněka kaj Friedrich. — Daŭro de 21.—23.30 h. —

Reorganizo. „Aprobinte la sintenadon de la Asocia delegito ĉe la Pariza Kongreso Dro Dítlík, la komitato post lego de la UFE-statuto kaj post pritrakto de ĝiaj ĉefaj punktoj, konsideras sin ne sufiĉe kompetenta decidi en tiel grava afero kaj transdonas la decidon al la ĝenerala kunveno.“

Tiu ĉi decido estos sciigita al ICK.

Oficeja fondaĵo. La komitato decidis fondi apartan fondaĵon por posedi ĉambron, kie funkcioj de ĈAE kaj pli poste ankaŭ pagita oficisto povos labori kaj kie estos konservataj iloj kaj dokumentoj, kaj malfermi kolekton inter ĉsl. esperantistaro por tiu ĉi celo. La statuto de tiu ĉi fondaĵo estos publikigita en Bulteno.

Ĉsl. n-ro de Literatura Mondo. La komitato aprobas la ĝisnunajn kontraktojn de s-ro Ginz kun la eldonantoj de L. M. kaj rajtigas lin fini ankaŭ la financojn de tiu ĉi entrepreno.

ĈAE-AELA-membreco: La eldonanto de Literatura Mondo s-ro Bleier proponas kontrakton pri komuna membreco kun favoraj kondiĉoj. La propono estos sendita al la neĉeestantaj membroj (Dro Kamaryt, Skleněka, Hromada) kun demando pri ilia opinio.

Gvidlibro de ĉsl. fervojoj: Nova eldono de fervoja ministerio estis dissendita al espaj gazetoj en najbaraj landoj por recenzo. Niaj samideanoj povas instigi siajn korespondantojn, ke ili postulu ĝin rekte ĉe Ministerio fervoja.

Filmo pri Kolonjo: ICK sciigis al ni, ke LKK sendos al Praha la filmon jam la 15. XII. 1932 anstataŭ en majo 1933. Ĉar ne estis eble fari necesajn preparojn tiel rapide, ĈAE petis reteni filmon ĝis kiam ni mendos ĝin.

Ĝenerala kunveno de ĈAE 1933: La komitato danke akceptis proponon de E. K. Hradec Král., aranĝi venontan ĝen. kunvenon en Hradec Králové. Estis dissenditaj specialaj aliĝiloj kaj ni petas la membrojn, ke ili bonvolu anonci sian ĉeeston jam nun.

30jara jubileo de E. K. Praha: La festojn oficiale ĉeestis vicprezidanto de ĈAE Dr. A. Dítlík, kiu transdonis al la jubilanta klubo ankaŭ asocian bondeziron. La prezidanto de ĈAE sendis apartan gratulan leteron.

E. K. Radvanice: La komitato donos laŭ la peto de s-ro Hanzelka el Radvanice konsilojn pri fondo de loka klubo.

Asocia bulteno: La komitato esprimas deziron, ke redakcio antaŭ preso de la Bulteno transdonu al ĝi presprovon por bontrovo.

ĈSL. GAZETARO KAJ ESPERANTO.

Nur nun venas al niaj okuloj Svět sovětů el marto nunjara kun interesa informo, ke estis arestita iu laboristo el Olomouc pro sia vigla esperanta korespondado kun SSSR.

De la kunveno de orientbohemiaj esperantistoj okazinta en Lázně Bělohrad alportas bildon Letem světem 22. XI.

Zájmy ĉs. pošt. a telegr. zřizenců havas preskaŭ regule informojn de eksterlandaj fakuloj-poŝtistoj, tradukitajn el esperanto. Tiun valoran servon prizorgas Ferdinand Votrubeč. La 1. XI. ni legis precipe interesan artikolon pri la poŝtista striko en Ĉinio.

Pri la ĉeĥoslovakaj pilgrimaj lokoj skribis ampleksajn artikolojn Espero Katolika. Salutis tiun propagandon pluraj ĉeĥoslovakaj gazetoj. Ni vidis Lidové listy 15. XI., Lid 13. XI.

Gazeto nepre nin favoranta estas Jiho český střed en České Budějovice. Ni legis en kelkaj gazetoj pri la esperanto-konkurso de ĉinaj studentoj. La saman artikolon ripetas J. s. la 18. XI., sed aldonas multajn amikajn vortojn kaj detalojn, kiuj ne estis al ni konataj. Strange nin tamen impresas la fina frazo, laŭ kiu en la konkurso „venkis ĉiuj pruvante tiel la facilecon de la lingvo“. Ankaŭ en aliaj okazoj montras sin Jihočeský střed bone informita pri nia movado.

Železniční zřizeneč 4. XI. havas iongan esperante skribitan artikolon pri la hispanaj fervojistoj kaj iliaj salajroj. Tiajn artikolojn ni tamen pli ŝatas vidi en traduko (kun klara noto pri esperanta deveno) por ke ili estu atingeblaj al ĉiuj legantoj kaj pruvu al ili la grandajn eblojn, kiujn prezentas nia lingvo.

Miraklo en lernejo de Olomouc estas detala priskribo en České Slovo 10. XI., de la laboro de direktoro Albín Neužil instruanta sukcese al siaj lernantoj esperanton. Pri sama afero parolas alia granda artikolo en Moravské slovo 8. XII.

Vintro alproksimiĝas estas bela artikolo de Josef Pešek en Nová Doba Plzeň 8. XI. instiganta al lernado de esperanto.

Laborista societo esperantista en Praha sendis laŭ Rudé Právo 10. XI. salutan leteron el USSR okaze de la 15-jara daŭro de Soveta respubliko.

Podkarpatské hlasy Užhorod 5. X. raportas pri esperanta laboro en tiu plej ori-

enta parto de nia respubliko. Estas anoncata kvarmonata kurso.

En Pražský skaut nro 8/1932 invitas Standa Lešinger en artikolo Skoltoj kaj esperanto al la venontjara Internacia Skolta Tendaro apud Budapeŝt kaj rekomendas al la partoprenantoj lerni esperanton.

Radiojournal 10. XII. informas pri la Zamenhofa vespero de la stacio Brno la 13. XII. kaj alportas unukolonan artikolon pri la krento de esperanto kun portreto de Zamenhof.

La belaj kajeroj de Slniečko, slovaka monata revuo por infanoj aperanta en Turčianský Sv. Martin represas post enkonduka artikolo (en nroj 1 kaj 2-1932) kurson de esperanto.

Ochrana Znojmo 1. XII. — esperanta rubriko kun informo pri skoltoj kaj loka esperantista vivo.

Auto de julio 1932 parolas pri la esperanto-sciantaj policianoj en Vieno.

Felietono en České listy Mladá Boleslav 9. IX.: rememoroj de Ludmila Dandová pri la XVI. katolika kongreso esperantista en Lourdes.

Oni dankas el Genevo por parolado pri Ĉeĥoslovakio — estas artikolo en Moravské Slovo 2. XI. rekomendanta uzon de esperanto por internaciaj disaŭdigoj.

Pri Jan Amos Komenský, antaŭdirinta esperanton skribas Ejs en Národní Politika 15. XI.

Kunveno de la Centroeŭropa instituto la 27. X. en Brno decidis peti de la ministerio por instruado aranĝon de esperantaj kursoj. Raportas pri tio Moravské noviny 28. X. 32.

Pri la paroladojoĝo de Bleier, eldonanto de Literatura Mondo, ni legis ĝis nun en Osvěta lidu Hr. Králové 23. XI., Kraj královéhradecký 26. XI., Pochodeň Hradec Králové 24. XI. Več. České Slovo Hradec Králové 28. XI. En Národní listy, Národní politika, Právo lidu 1. XII., Náš kraj Mladá Boleslav 1. XII., Več. České slovo Ml. Boleslav 2. XII. kaj 5. XII., Mladobošleslavské listy kaj Jizeran Ml. Boleslav 3. XII.

Nová práce en nro 11/1932 alportis laŭ informo ricevita artikolon de J. K. Kosina: Ĉu estas bezona internacia lingvo?

En Spolupráce nro 9-12/1932 donas Julie Šupichová bonan priskribon de la esperanto-movado ĉeĥoslovaka kaj tutmonda.

MOVADO EN ĈSR.

Oficiala instruado.

Kežmarok. En burĝa lernejo instruas en 1932/3 esperanton kiel nedevigan fakon instruistino de la lernejo f-ino Margit Feldmannová al 16 lernantoj.

Lokaj informoj.

Ústí n. L. La 9-an de oktobro 1932 estis tie fondita „Ĉeĥoslovaka Laborista Asocio Esperantista“. Ĝi estas dua laborista asocio en nia ŝtato. Laŭ ĝia proklamo „aniĝi povas ĉiu esperantisto, kiu estas ano de la socialdemokrata partio, de ia libertendenca sindikato aŭ kultura laborista organizo, aŭ kiu ne kontraŭas la laboristan movadon“. Sekretario estas Tischer, adreso: Ústí n. L. Lange Gasse 38.

Kolín — Esperantista Klubo aranĝis la 16. septembro 1932 publikan paroladon pri signifo de esperanto. Parolis s-ro Dro. Jos. Fousek el Přelouč. Ĉeestis 20 personoj. Estis malfermitaj kursoj por komencantoj kaj por progresintoj. Gvidas ilin sinjoro Janda.

Košice. Esp. Klubo elpendigis en montrofenestroj sur la ĉefaj stratoj 10 afiŝojn de ĈAE kun informo pri nova kurso. En la reala lernejo S-ro Friedrich disdonis 100 Pojítko. Sekvoj de la Scherer-paroladoj kaj de la esperantista partopreno en la ekspozicio de la Tutmonda Preso estas 3 kursoj. Du kursojn gvidatajn de S-ro Jos. Friedrich vizitas pli ol 100 p., inter ili 60 lernantoj de reala gimnazio kaj 16 skoltoj. Kurson por hungaroj kaj germanoj, gvidatan de S-ro D. Krémer, vizitas 35 personoj. Ankaŭ la klubaj kunvenoj revigliĝas, vizitas ilin ĉiam 15-20 klubanoj.

Uherské Hradiště. La Esperanto-Dimanĉo (30. X.) ĉi tie boneĝe sukcesis. La granda urba teatro Reduta senpage disponigita estis la plej taŭga ejo kaj ĝi estis preskaŭ plena. Lerneja inspektoro s-ro V. Sehnal malfermis per tre varmaj vortoj por esperanto, kvankam ĝis ne longe li kontraŭstaris nian movadon. Poste li atente sekvis, same kiel ĉiuj aliaj, la interesan paroladon de s-ro Neužil el Olomouc, invitita de Instruista Unuiĝo. Post la parolado sekvis prezentaĵoj de 12 ĝelernantoj, kiuj en multaj lecionoj kaj deklamoj prezentis rezultojn de speciala metodo de s-ro N. Ekspozicieto de gravaj dokumentoj kaj de korespondadoj interlernejaj trovis intereson.

De la 9. Novembro okazas ĉi tie publika Ĉe-metoda kurso, gvidata de instruisto s-ro Bartošík Dofa. Protekton akceptis Regiona porkultura

societo, kies prezidanto estas s-ro inspektoro Sehna. Aliĝis 30 p., inter ili ĝeinstruistoj kaj lernejdirektoroj. db

Louny. La loka popolkleriga societo aranĝis la 26. Oktobro paroladon pri esperanto, ĉeestis 80 personoj, el kiu 20 aliĝis al kurso, organizita de la sama societo senpage. Parolis kaj instruas s-ro Pavel Cahák lernejestro en Malnice.

-K

Postoloprty. Kursojn por Ĉeĥoj kaj Germanoj gvidas en tiu ĉi urbo s-ro Cahák, lernejestro por 32 p. -K

Mladá Boleslav. En ĉiuj lokaj gazetoj estis plurfoje publikigitaj mallongaj informaj artikoloj kaj sur diversaj lokoj de nia urbo en montraj fenestroj de lokaj komercistoj estis multaj afiŝoj de Asocio ricevitaj aŭ niaj propraj, anoncantaj aranĝon de Espa kurso.

En du lokaj librejoj ni aranĝis ekspozicion de espaj libroj, gazetoj kaj korespondaĵoj, en du kuracistaj atendejoj kaj en nia publika legejo pendas afiŝoj por daŭra apliko.

Ni anoncis per specialaj leteroj al Osvětový sbor, Klub přátel umění, al ĉiuj kulturaj sekcioj de politikaj partioj kaj gimnastikaj societoj, al direktoroj de niaj mezaj lernejoj kaj al garnizona komandanto, ke ni aranĝos publikan kurson de Espo kaj ni petis ilin, rekomendi ĝin inter studentoj kaj soldatoj, aŭ inter siaj partianoj.

La 25an de oktobro okazis kunveno de interesatoj pri Espo, en kiu parolis s-ro prof. Josef Kožený „Pri utileco kaj valoro de Espo“. Paroladon partoprenis 55 personoj.

La sekvantan tagon komencis en popola knaba lernejo kurso publika, kiun partoprenas 35 personoj, la 8an de novembro komenciĝis kurso por 22 ĝis nun aliĝintaj lernantoj de komerca lernejo, kies direktoro estas tre favora al la aranĝo. Ambaŭ kursojn gvidas s-ro prof. Josef Kožený.

Krom tio espereble efektiviĝos kurso por soldatoj en Vojenské zátíši, kiun gvidos s-ro Moucha.

Kopřivnice (Moravio). Kurson por 18 personoj gvidis s-ro Zámarský, del. de UEA.

Ústí n. L. En la Komerca Akademio prof. Alfred Eckelt, del. de UEA, instruas 21 stud.

Police nad Metují. S-ino Běla Reichlová, del. de UEA en Náchod, parolis pri esperanto la 13. Nov. Sekvis kurso por 17 ĝelernantoj, gvidata de s-ro Josef Braha, del. de UEA en Petrovice.

České Budějovice. S-ro Josef Ploss instruas en du kursoj 25 p.

Praha. S-ro dir. Řádek gvidas trian kurson por policistoj kun 34 p.

Komárno. Kurson por mezlernejaj skoltaj gvidas s-ro Havas, VD de UEA. — Publikan kurson por 36 p. gvidas s-ro Sprušanský, del. de UEA.

Hradec Králové. Kurson por komencantoj en kadro de klubaj kunvenoj gvidas s-ro Skleněka. Ĝi estas senpage, sed kun devo aliĝi post 3 Iccionoj al la klubo, kaj pagi almenaŭ duonjaran kotizon. 12 partoprenantoj. Skl.

Pardubice. Kurson por 12 p. gvidas faka instruistino f-ino Michalová.

Prešov. Kurson por studentoj en gimnazio gvidas en lernejjaro 1932-33 profesoro Frant. Novotný. Instruas laŭ lernolibro de Bednář 31 partoprenantojn unu horon semajne.

Radiojournal Brno dissendas esperantan kurson por komencantoj, marde kaj ĵaŭde je la 17.50 ĝis la 18 a horo, jam de la 6. oktobro. Post la fino de la kurso sekvos espaj paroladoj. Brno tre favoras esperanton, subteno laboron kaj danku per poŝtkarto al Radiojournal en Brno, CSR. elspezante sumeton.

22.000 personoj vidis esperanto-ekspozicion.

Ankaŭ ministro Slávik.

La ekspozicio de la tutmonda presoj, kiu okazis en Košice la 21. VIII. ĝis 11. IX. enhavis ankaŭ fakon kun abunda esperanto-materialo; la fako estis dividita je subfakoj: E. kaj komerco, E. kaj fremdula movado, E.-literaturo kun angulo de Zamenhofaĵoj kaj alia kun tradukoj el la ĉeĥa literaturo, fine E.-gazetaro. La ekspozicion vizitis 22.000 personoj kaj vere la ĉefan intereson vekis nia Esperanto-Fako. Ĉe la vitra ŝranko, kie estis ekspoziciaj niaj libroj en luksa eldono, staris ĉiam homoj mirantaj pri abundeco de esp. eldonaĵoj. La ekspozicion vidis multaj gravaj personoj, i. a. Dro J. Slávik, ministro de Internaj aferoj, kiun gvidis tra nia ekspozicio la prezidanto de E. K. Košice, s-ro fervoja konsilisto Josef Friedrich. La ekspozicia katalogo enhavis ankaŭ informan artikolon pri esperanto.

of

Milofice u Kyjova. S-ino instruistino Bábíčková instruas 25 infanojn de kvina klaso popollerneja.

Ligo de katolikaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo havis jaran kunvenon 28. IV. 1932 en Praha. Laŭ prezentita raporto la Ligo havas 131 membrojn, el kiuj estas 40 en la loka katolika klubo en Praha, 31 en Brno, 22 en Trnava, ceteraj izoluloj. Membraj kunvenoj okazas ĉiuŝaŭde 19—21 horo en Praha II. en restoracio en strato Ostrovní 18. Komitataj kunvenoj estis 10. La Ligo aranĝis du kursojn (unu elementan, unu por progresintoj). Estis elektitaj prez. Dr. A. Eltschkner, kanoniko, vicprezidantoj Fr. Zelenka, landa komitatano, kaj f-ino L. Dandová, sekretario Fr. Buhr, kasis-to F. Kozel, bibliotekistino s-no A. Krolopová, komitatanoj Fr. Kudrna, A. Kuchař, vic-komitatanoj L. Penzová, Fr. Ramboušková, revizoroj Ter. Trojanová, A. Holoubek, vicrevizoro Dr. J. Hewera.

Kladno. Okaze de la vizito de Miss Marta Root el Ameriko al f-ino Vičková en Dubí oni aranĝis senprezare esp. paroladon pri Bahajismo en la lernejo en Vrapice en la lernoĉambro afable disponigita de lernejestro s-ro Sladký. La parolado okazis dimanĉe la 15. I. 1933 je horoj 10—12 antŝgm. kaj partoprenis ĝin 30 personoj plejparte instruistoj kaj oficistoj. Ĉeestis ankaŭ kelkaj samideanoj kaj aliaj gastoj el Kladno. Pro intereso pri E. oni intencas aranĝi kurson. S-ro lernejestro, kiu iomete scipovas E. instruas la lingvon al kelkaj lerneĵanoj. Li estus dankema pro alsendo de taŭga instrumaterialo. St.

Novaj propagandaj flugfolioj ĉeĥlingvaj. Teritoria oficejo de UEA aperigis ĉeĥlingvan eldonon kaj adapton de la propaganda flugfolio laŭ teksto, kiun farigis antaŭnelonge UEA. Ĝi estas ok-paĝa detala tre elokventa alvoko kun diversaj alineoj, tre konvinka. La informo pri nia Asocio ĈAE estas tre taŭga. La ĉeĥan adapton faris tre sukcese s-ro Ginz. La titolpaĝo havas fotomuntaĵon kaj devizon: *Jeden jazyk pro celý svět!* Ĝi estis dissendita kun Teritoria tribuno al pli ol 2500 adresoj. Vendas ĝin Teritoria oficejo en Hradec Králové 100 ekz. po 20 Kč. — UEA delegito A. Veverka en Mukačevo eldonis kvarpaĝan flugfoliojn titolitan „*Esperanto a jeho poslání mezi národy*“. Ankaŭ ĝi meritas esti disvastigata. Grava manko de ĝi estas, ke ĝi ne havas eĉ adreson de ĈAE.

Parolad-vojaĝo de V. Bleier.

Laŭ peto de eldonisto de la *Literatura Mondo* organizis ĈAE lian vojaĝon al lokoj, kiuj estis petintaj pri lia prelego. La vojaĝo okazis akurate laŭ la plano kunmetita de s-ro Ginz, kiu faris preskaŭ komplete la koncernan organizan laboron. S-ro Vilmos Bleier parolis pri „*Esperanto-literaturo kaj esperanto-verkistoj*“ 26. XI. 1932. en Bratislava (35 partoprenintoj), 29. XI. en Brno (39 p.), 30. XI. en Hradec Králové (30 p.), 2. XII. en Praha (Klubo, 60 p.), 3. XII. en Liberec (kie li venis pro malfruiĝo de la vagonaro kaj posta miskompreno de la horaro nur post je la 22-a horo, kiam la aŭskultontaro jam estis parte foririnta, el kio rezultis anstataŭ prelego amika konversacio en malpli vasta rondo sed same instrua), 4. XII. en Mladá Boleslav (20 p.). En sia prelego s-ro Bleier en tre agrabla formo informis pri literaturaj teorioj de la ĉefaj kunlaborantoj de la *Literatura Mondo*, pri iliaj ĉefaj verkoj, pri diskutoj pri la neologismoj en la beletristika lingvo, kaj pri homaj kvalitoj de la verkistoj. Lia prelego estis same amuza kiom instrua. Li portis kun si provizon de libroj eldonitaj de la L. M., kiujn li proponadis post prelego por aĉeto. Laŭ sia informo s-ro Bleier estis kontenta kun ĉi tiu rezulto, kio nin tre ĝojigas, ĉar certe estas grave kaj utile por la movado, ke la esp-istoj legu la novajn verkojn. Tial ni estas firme konvinkitaj, ke vojaĝo de samideano Bleier estis tre utila por nia movado kaj ni dankas lin tre sincere pro lia iniciato kaj finita verko.

S. K.

Ostatní zprávy v příštím čísle.

MEMBRA KOTIZO DE ĈAE

Kč 16.—.

(subtenantoj Kč 50.—, dumvivaj Kč 500.—).

ČLENSKÁ PREMIE :

S = Svaz Národů o Esperantu 48 stran
C = Collinson „*Esperanto a jeho kritikové*“ 24 stran
V = Jak byl rozluštěn problém mezinárodního jazyka pro obchod a styk s cizinou. 44 stran
Poj. = 20 propagačních letáků „*Pojítko*“
P = Paco per lernejo 32 stran
D = Devoj de la homo 164 stran
Z = 10 pohlednic s obrazem Dra Zamenhova.

Sendu aliĝan poŝtkarton

al *Otto Sklenčka, kasisto de ĈAE, Hradec Král. 628a*

Ceteran korespondojn por ĈAE adresu al

Praha XIX. Uralské, 447.

Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze čís. 238.888/VI-23.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HRŮMADA - Preŝis JAN MINAŘ NYMBURK.

Prosíme Vás o zaslání předplatného.

Složenka byla přiložena k číslu 1. Po-
užijte eventuelně bianco složanky (za
5 hal. na pošt. úřadě), kterou vyplňte
jménem: „ČASOPIS LA PROGRESO
PRAHA“ a čís. 34.271.

Prosíme o zaslání předplatného.

Nemáte-li složenky, zašlete peníze (20.— Kč) bianco-složenkou (za 5 hal. na pošt. úřadě) kterou vyplňte číslem 34.271 s adresou La Progreso Praha VII.